



BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la
BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA

(I. K. U. E.)

APRILIO 1913

ENHAVO:

Pri la kotizajoj. -- Nomaro de la Belga Katolika Ligo. -- Listo de personoj kiuj rifuzis la Postkvitancon. -- Mirindaj konvertigoj en Anglujo. -- La Katolika Eklezio juĝata de Protestanto. -- La nova Katolika grupo en Antverpeno. -- Nacia funebro -- Esperanto kaj la Framasonaro. -- Frans Van Cauwelaert kaj liaj postuloj. -- La Floro. -- Vizito al la Hospitalo de la Granda S^{ta} Bernardo. -- Alvenu multnombre al Romo

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

ĉe LEO HEIDENDAL.

A R E N D O N K

BELGA KATOLIKO

ORGANO DE
LA
Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)

REDAKCIO : Por ĉio kio koncer-
nas la redakcion (artikoloj —
informoj — broŝuroj — libroj —
k.t.p.) oni sin turnu al :



Sro Leo Heidental, ARENDONK.

NACIA SEKCIO DE LA
Internacia
Katolika Unuigo Esperantista
(I. K. U. E.)

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio
koncernas la administracion (re-
klamoj — mensejoj — anoncoj
— k.t.p.) oni sin turnu al :

Pri la kotizajoj.

En nia lasta Decembra Bulteno ni avertis niajn geliganojn ke oni prezentos ĉe ili dum la januara monato poŝtkvitancojn por la kotizaĵo je 1 fr. por tiu ĉi jaro 1913.

Unue, ni dankas ilin kiuj pagis la kotizaĵon kaj ebligis al ni, laŭ nia promeso, presigi almenaŭ unuan liston de niaj membroj. Sed bedaŭrinde multaj ne pagis, kaj revenis, konsekvence, multaj poŝtkvitancoj al ni kun la vorto « rifuzita », presita sur la kvitanckarto.

Tamen, ni ne dubas ke multaj el ili estis rifuzitaj erare. Efektive, kelkaj jam skribis al ni ke la kvitanco estis prezentita ĉe ili dum ilia foresto, pro tio la servistino rifuzis pagi. Aliaj skribis al ni ke iliaj adresoj estis ŝanĝitaj, kaj tiel plu. Do, ĉar ne estas eble skribi aparte al ĉiu por peti klarigon, ni decidis en tiu ĉi Bulteno, post la unua nomaro de membroj, doni la liston de tiuj kiuj ne akceptis la kvitancojn, escepte de tiuj, kiuj poste skribis al ni por doni klarigojn. Ni sendos do tiun ĉi Bultenon al ĉiu enskribita membro.

Tia maniere, la ne pagintoj havos la okazon konstati ke la poŝtkvitancon estis prezentita ĉe ili kaj, pro unu aŭ alia kaŭzo, estis rifuzita.

Tiuj el ili kiuj deziras restadi membroj de la Belga Katolika Ligo bonvolu skribi al nia honora kasisto S^r Abato Minten, 41, Potgieterstraat, Antwerpen. Ĉiuj kiuj, 10

tagojn post la akcepto de tiu ĉi Bulteno, nenion sciigos al Abato Minten, montros per ilia silento, ke ili ne plu deziras restadi en nia Ligo. Konsekvence ni forstrekos iliajn nomojn el niaj libroj, kaj ni ne plu sendos al ili la Bultenon « Belga Katolika ».

Do, jen nia unua listo.

Nomaro de la Belga Katolika Ligo

UNUA LISTO

Honora membro : Lia Eminentia Kardinala
Moŝto Van Rossum

- Abato Honincks, Prezidanto.
- Abato Van Oevelen, Vic-prezidanto.
- S^ro Van Melckebeke, Vic-prezidanto.
- S^ro L. Heidental, Ĝenerala Sekretario.
- Abato Minten, Kasisto.
- Abato Richardson, Prezidanto de I. K. U. E.
- Abato Huwaert.
- Abato A. Lambo.
- Fino Leona Solvijns.
- S^ro Oscar Van Schoor.
- Abato P. Cauwenberg.
- Abato Van Essche.
- S^ro Pierre Kersten.
- » Charles De Preter.
- » Henri Grégoir.
- S^ro Hector Lohisse.
- » Alexis Hecq.
- » Robert Dubosc.
- » Jean Van Peborgh.
- » Alois Mathé.

S^{ino} Van Reusel.
 F^{ino} Mathilda Claessens.
 S^{ro} Alfred Mampaey.
 Abato F. Cauwenberg.
 Frato Vincent.
 Fratino Xaveria.
 » Augustine.
 Patro Van de Veer.
 S^{ro} Leon Grégoir.
 » Antoine Cocks.
 Frato Izidoro.
 S^{ro} Witterijck.
 F^{ino} Bertha Ledene.
 S^{ro} Van Peteghem.
 » Albert Maertens.
 La Grafino C. de Villers.
 Frato Vincent.
 Abato Walravens.
 S^{ro} Polydore Stappens.
 S^{ino} Milson.
 D^{ro} P. Le Comte.
 S^{ino} O. Van Schoor.
 Abato Van Doorselaer.
 S^{ro} Leuner.
 Eerw. moederoversten der Maricolen Zusters
 S^{ro} Alf. Wauters.
 » Alf. Menten.
 Abato Embrechts.
 Abato Donvil.
 Abato F. Peter.
 Zuster Xaveria.
 S^{œur} Augustine.
 S^{ro} Leo Decoene-Hautekeete.
 F^{ino} Cesarie Decoene.
 » Clara Hanssens.
 » Rachel Decoene.
 » Margaretha Delpierre.
 » Alice Decoene Hautekeete.
 » Martha Cornet.
 » E. VandenBergh.
 S^{ro} Parotte.
 S^{ino} Parotte.
 F^{ino} Rosa Wuyts.
 S^{ro} Barbe de Kneef.
 » Jan Goris.
 » J. Ruttiens.
 Patro VandeVeer.
 Patro Vewaet.
 Patro Drieghe.

S^{ro} Van de Putte.
 » Philippens.
 S^{ino} Philippens.
 S^{ro} Malget.
 Très Rév. Père Camille Van de Steene.
 Rév. Père Schäfer-Redemptoriste.
 » » Pönchau.
 » » Claude.
 » » Offenberg.
 » » Lefèvre.
 Eerwaarden Heer A. Van Heesch.
 S^{ro} E. Cuvelier.
 Eerw. Heer Van Giel.
 S^{ro} J. VandeVelde.
 F^{ino} Maria Blomme.
 S^{ro} Gerard Beniest.
 » Jos. Peeters.
 F^{ino} Cuvelier.
 S^{ro} de Keukelaere.
 » Henri Petiau.
 Abato Vanderheijden.
 S^{ro} Georges Desgain.
 S^{ino} D^{ro} Biske.
 Eerw. Zuster Elisabeth.
 F^{ino} Louisa Monbis.
 Pensionsaat Mariakroon.
 S^{ro} De Bruyn.
 M^{elle} Portier.
 » Hoffmann.
 S^{ro} Desonay.
 Abato Populaire.
 S^{ro} Désiré Halleux.
 » K. Joossens.
 » Van Acker.
 » Molitor.
 » Lodewijk Braet.
 » Michiel Sebruyns.
 » Dreessens R.
 » Neybergh J.
 » S. Defawe.
 » VanderVorst.
 » S. Dervant.
 F^{ino} Stronck.
 F^{tro} Leopold Econome.
 S^{ro} G. Lippens.
 » Patro Decoene.
 » Abato Alberic Decoene.
 R^{da} Patro D. Gerard Moyaert O. S. B.
 S^{ro} Edmond-Chansay.
 Eerw. Pater Bernardo Clonen O. S. B.

S^{ro} Victor Lamberts.
 • Oscar Portray.
 » N. Navir.
 • P. Deprimez.
 • Marcel Cellard.
 • M. DeNeyer.
 • K. Monteyne.
 » H. Verwilghem.
 » H. Halewijck.
 • J. Gautier.
 • Maurice DeValkeneer.
 • Pierre Cattoir.
 • Maurice Loix.
 • Jules Van de Velde.
 • Maurice Van Weyenberg.
 » Andre Van Praet.
 S^{ino} J. Borckmans.
 » Letiexhe.
 • L. Lebrun.
 F^{ino} Decerf.
 Societo « Esperanto » de Spa
 S^{ino} Leonard.

Listo de personoj kiuj rifuzis la Postkvitancon.

F^{ino} M. Maertens.
 S^{ro} Georges Mignon.
 • R. Vanderkerkhoven.
 • R. Deleener.
 • G. Borremans.
 S^{ino} Leuner.
 S^{ro} Edgard Lonette.
 • Camille Van Oorlee.
 • H. Van den Borne.
 • Monlaert.
 • Gerard Vangheluwe.
 • Hilaire Tanghe.
 • Vandendriessche.
 • Marcel Milcam.
 F^{ino} Marg. Wicart.
 S^{ro} Raymond Wicart.
 • Jos Meulemans.
 • Jos. Van Overstraeten.
 • Albert Degeneffe.
 • VandenDijck.
 S^{ro} Jos. Mievis.
 S^{ro} Fr. Vanderheyden.
 • Schaltin.

S^{ro} Vital Boel.
 • E. Herbays.
 • Antoon Goeyens.
 Société belge de Librairie.
 S^{ro} Karel van Hees.
 • Kempenaars.
 F^{ino} Marg. Sielegheem.
 S^{ro} Paul Goris.
 • J. Carthuijvels.
 • Rogister.
 » Tl. Elbers.
 • L. J. Leboutte
 • Yzerbijt.

Mirindaj konvertigoj en Anglujo.

Je la komenco de Marto okazis en Anglujo, aŭ pli precize en la antikva kelta Kimro, ara-akcepto en la Katolikan Eklezion de pli ol 50 gereliguloj anglikanoj. Ni devas reiri memore ĝis la fama ekzodo kiu sekvis la konvertigon de Newman je 1845 por trovi tiel mirindan ekzemplon en Anglujo.

La okazo estas tiel konsolanta, kaj naskis esperojn tiel grandajn ĉe la koro de ĉiu vera katoliko, ke mi opinias plezurigi al niaj legantoj donante al ili kelkajn klarigojn pri la estinto de tiuj du religiularoj kiuj are eniris la Ŝafejon de la Bona Paŝtisto. Cetere, ni Esperantistaj katolikoj havos specialan rajton ĝoji pri tiu efiko de la dia graco, tial ke unu el la ĉefaj celoj de la I.K.U.E. estas labori al la reunuiĝo de niaj anglikanoj kaj « ortodoksaj » gefratoj al la S^{ta} Roma Seĝo. Ni jam havis multajn interrilatojn kun ili. Per tiuj esperantistaj rilatoj jam naŭ geanklikanoj konvertiĝis al la vera Eklezio, kaj eĉ mi persone renkontis en Budapest dum « Nia Tria » anglikanan « monaĥon » kiudonis al mi interesajn sciigojn pri la Abatejoj de Caldey kaj de S^t Brides.

Por bone kompreni la origon de tiuj du societoj mi petas miajn legantojn sin turni al artikolo kiun mi verkis por « Espero Katolika » antaŭ tri jaroj pri tiu stranga viro, angle nomata « Father Ignatius Lyne. » Tiu entuziasmulo de post 1860 komencis

klopodi al la starigo, en la ŝtateklezio de Anglujo, la antikvan ordenon de S^{to} Benedikto, kiu, antaŭ la deksesaj Jarcento, kovris Anglujon per siaj geabatejoj kaj priorejoj. Mi ne havas la tempon hodiaŭ ripeti la detalojn de tiu stranga viro. Mi nur memorigos ke li sukcesis, fine, fondi en Llanthony en Kimbro Abatejon por monaĥoj kaj malgrandan domon por virinoj, sed li nemiam sukcesis konservi siajn infanojn kiuj, post iom da tempo, aŭ iĝis katolikoj, aŭ forlasis lin. Sed en 1897 aŭ 1898, alia anglikano, viro multe pli serioza kaj egale fervora, rekomencis la saman laboron sed tute alimaniere. S^{ro} Carlyle, estis lia nomo, havis pli ol 30 jarojn. Li estis bone konata pro sia prudento kaj saĝa pieco. Lia influo estis tiel granda ĉe aro da 24 piaj viroj havantaj similajn opiniojn kiel li, ke ili fine konsentigis lin iĝi sian estron, sian abaton. Post lia elekto li prenis al si la nomon de Aelfred, nomon de antikva Anglo-Saksona Sanktulo.

Iu pia nobla Anglikano, kies nomo, pro lia modesteco, mi devas forŝalti, helpis ilin grade aĉeti insuleton nomita « Caldey » kiu kuŝas en la maro tre proksima de Tenby en Kimro, Anglujo. Sur tiu insuleto ekzistis la ruinaĵoj de antikva Benedikta Abatejo. Tie tiuj kuraĝaj junuloj fondis sian novan Societon, tie ili vivos, laboros, kaj preĝos. De post 15 jaroj ili sekvis tre serioze la Regularon de S^{to} Benedikto. Alloĝitaj de la famo de tiuj piaj viroj, ĉirkaŭ 37 anglikanaj monaĥinoj, varbitaj unue de « Patro Ignatius, » sed poste iom malkontentaj pro la stranga agmaniero de tiu « strangulo », alvenis kaj aĉetis domon kaj bienon apud Milford Haven, proksime de Caldey kaj petis Abaton Aelfred bonvoli ilin direkti. Sed tiu pia kaj humila viro havis dubojn pri sia rajto estri kaj direkti gemonaĥojn sen la aŭtoritato de siaj ekleziaj aŭtoritatuloj. Li, do, unue sin turnis al la ĉefepiskopo de Canterbury kiu estas la religa Estro de la Anglikana Eklezio. La tiama eparĥiulo estis D^{ro} Temple, viro ne tre « high church », sed tamen, viro tre tolerema kaj admirante ĉiun sinceran etuziasmon. Li ekzamenis ilian Regulon, kuraĝigis ilin, kaj lasis al ili plenan liberecon pri la religiaj detaloj de ilia

vivo. Tiam Abato Aelfred kaj liaj ge-benediktanoj sekvis la katolikan emon de siaj koroj. Ili elektis la Breviarion kaj la Misalon de la katolikaj Benediktanoj, kaj imitis tiujn lastajn ĉiunmaniere. Precipe ili imitis la grandegan amon kaj kulton de la Benedikta familio por la S^{to} Dipatrinio Maria. Tiu ĉi bona Patrino ne forlasis siajn erarantajn sed sincerajn infanojn. Neniam Maria mankas al ni, kiuj alvokos kaj amas ŝin. Post la morto de D^{ro} Temple niaj Benediktanoj akceptis la direkton de Protestanta Amerika Episkopo kiu, tolerema kiel D^{ro} Temple, lasis al ili plenan liberecon. Sed, je la komenco de tiu ĉi jaro, tiu Episkopo mortis kaj la bona naŭva Abato sin turnis al la nuna Ĉefepiskopo de Canterbury. Sed tiu Sinjoro tute ne similas al D^{ro} Temple, li tamen tre afable petis ilin sin turni, je sia nomo al D^{ro} Gore la Episkopo de Oxford. Certe niaj geamikoj ŝuldas tiun elekton al la Dia Providenco, ĉar la respondo de D^{ro} Gore tuj malfermis la okulojn de tiuj piaj sinceraj viroj, kiuj, de post 15 jaroj, vivis tre malproksime de la anglkana mondo, kaj, sekvante plenan katolikan vivmanieron, nesciis la veran staton de la Ŝtateklezio. D^{ro} Gore ne estas ordinara viro, li tute ne estas protestanta bigoto, male, ĉiuj liaj gustoj emas al la katolika portio de la Ŝtateklezio. Li estas, samtempe, tre tolerema li plene toleras en sia eparĥio pastrojn kiuj neas la diecon de Kristo, la virgan naskon de Mario, la realecon de la Reviviĝo de Jesu k. t. p. Sed tiu klera, tolerema episkopo, tamen ne povis toleri keikajn religiajn kutimojn de la Caldey — benediktanoj. Li do respondis, post la ekzameno de ilia regulo, ke ili devus tuj forlasi unue, la latinan-romanon liturgion, due, la rezervon de la S^{to} Eŭkaristio en la Tabernaklo kaj la Ekspozicion de la sama sur la Altaro, 3^o ke ili devas ĉesi publikan alvokon al la Dipatrinio kaj al la aliaj Sanktuloj, kaj precipe ĉesi la publikan diradon de la rozarion. Je la 18 de Februaro la Abato legis la tutan korespondon inter li kaj D^{ro} Gore al siaj fratoj, kaj petis al ĉiu lian opinion. Preskaŭ ĉiuj (krom ses) konsentis laŭvorte kun la Abato, dirante ke ili preferas la morton ol la apostazion kaj aldonante ke la

respondo de la Episkopo plene malfermis iliajn okulojn al la hereza stato de la Anglikana Eklezio el kiu ili devis tuj foriri por certigi la savon de iliaj animoj. Tio estis la komenco de la feliĉa fino. Je la 22^a de Februaro Festo de la S^{ta} Seĝo de Petro, la Abato kaj siaj gefratoj skribis al vera Katolika Patro Benediktano Dom Bede Camm, kun kiu ili jam estis havintaj kelkajn interrilatojn. Permesita de siaj superuloj Dom Bede alvenis kaj vizitis unue la insuleton de Caldey poste la monaĥinejon de S^{ta} Brides kaj donis al ili la necesan instruon por ilin prepari al la solena akcepto en la Katolikan Eklezion.

Estis Lia Moŝto Dom Columba Marmion Abato de Maredsons apud Dinant en Belgio kiu estis speciale delegita de la Sankta Roma Seĝo por doni al tiuj novkatolikoj la religian « retreton » preparantan ilin al ilia formala akcepto kiu okazis por la monaĥoj je la 5^a de Marto kaj por la piaj virinoj de S^{ta} Brides je la 7^a. La granda plimulto de la gekonvertiĝoj esprimis la deziron daŭrigi la religian vivon laŭ la regulo de S^{ta} Benedikto.

Je la 19^a de Marto Lia Abata Moŝto Dom Marmion de Maredsons skribis al mi ke S^{ta} Carlyle estas kun li kiel novico kaj li aldonis ke li edifias la tutan komunumon per sia forvoro kaj humileco. La estonteco estas inter la manoj de Dio sed ŝajnas kredinde ke post unu aŭ du jaroj tiuj piaj gereligiuloj rekonvenos en Caldey kaj en S^{ta} Brides por eble daŭrigi sian religian vivon sub siaj estintaj gesuperuloj sed pri tio ili ĉiuj nur deziras sekvi la volon de Dio kaj de siaj katolikaj superuloj.

Je la 2^a de Marto la Sankta Papa Moŝto Pio X^a sendis al ili la sekvantan telegramon « La S^{ta} Patro ame benas la novajn gekonvertiĝojn enirantajn la Kristan Ŝatejon kaj li preĝas ke Dio plenigos ilin je ĉiu graco. Kardinalo Merry del Val.

« Laetatus sum in his quæ dicta sunt mihi : in domum Domini ibimus. »

Mi ĝojis pri tio kion oni diris al mi : ni eniros la Domon de Dio. »

AUSTIN RICHARDSON.

La Katolika Eklezio jugata de Protestanto. (El la Revue Apologétique.)

D^{ro} Foerster, eksprofesoro de pedagogio en la Universitato de Zurich, skribis antaŭ ne longe :

« Hodiaŭ, post historio preskaŭ dudekjarcenta, ni povas senpartie prijuĝi la potencon ellaboraĵon plenumitan de la Apostoloj de Kristo. laŭ la volo de sia Majstro.

En nia dudeka jarcento, tiu majesta konstruaĵo, la Katolika Eklezio, elradias en sia tuta unueco, en sia tuta beleco. Nenia tera potenco iam kapablis ŝanceli ĝin.

Kontraŭ la roko de la Eklezia Unueco, kion efikis la persekutado de la Romaj Cezaroj, la herezaj mezepokaj ideofluoj, kaj la dissolvantaj emoj de la Reformacio ?

Hodiaŭ la glavo dormas, sed akra batalo furiozas kontraŭ la diaj institucioj, kontraŭ la papeco. El sia alta observejo, dum ĉiuj jaroj, la papa dinastio estis atestanto de interpopolaj militadoj. Generacioj naskiĝis, generacioj malaperis, kaj la Eklezio vidis ĉiujn siajn malamikojn deglittantajn en la tombon. Ĉirkaŭ la Eklezio, ĉio senkoloriĝis, ĉio mortis ; sola ŝi konservis sian junecan forton kaj sian belecon. La popoloj de la tero rigardis al ŝi, kaj petis ŝian protektadon. Ŝi akceptis ilin. Ŝi donis al ili la bonfarojn de civilizacio. Ŝi instruis ilin ŝati la vivon.

Poste, kiam ili sentis sin fortaj, ili opiniis, ke ili ne bezonas ŝin plu.

Tiu konduto afliktis, sed ne senkuraĝigis ŝin, ĉar en ŝi sidas Dia forto. En malfacilaj horoj, Dio starigis, por direkti Sian Eklezion, virojn fortajn per ilia volo kaj karito.

Interligita kun la Eklezio per miloj da vejnoj, la papeco estas por ŝi la principo de unueco. La papeco estas la roko, sur kiu tiu Eklezio estas konstruita. La papeco estas Petro vivanta en siaj posteuloj. Hodiaŭ disvastiĝas pli kaj pli la konvinko, ke estas necese havi videblan aŭtoritaton pri rivelitaj veroj ; kaj ju pli nia epoko klopodas por liberigi sin de aŭtoritato, des pli insistema fariĝas la invito submetiĝi al la plej alta aŭtoritato ekzistanta en ĉi tiu mondo. Sen ia aŭtoritato-interpretisto de la tradiciaj dog-

moj, la aŭtoritato de Kristo kaj de la Evangelio estas nur sensenca vorto. »

Tradukata de « RAMO. »

La nova Katolika grupo en Antverpeno.

De post la apero de nia Decembra Bulteno stariĝis en Antverpeno la unua eksklusiva katolika grupo en Belgujo. Ni diras la unua grupo, ĉar nia Belga Katolika *Ligo* vivas kaj kreskas de post pli ol tri jaroj. Sed ĝis nun nia Ligo ne ĝuis intimajn interrilatojn inter siaj membroj. Kio iĝus la Belga Ligo Esperantista se ĝi nur posedis apartajn membrojn? Se la diversaj urbaj kaj vilaĝaj grupoj ne ekzistis? Nidevaskonfesi ke ĝi estus nacia Ligo preskaŭ sen nacia vivo. Efektive, estas la grupoj, pro iliaj intimaj rilatoj, iliaj oftaj kuvenoj, unuvorte pro ilia komuna vivo, kiuj donas al iu ajn Ligo ĝian forton, ĝian entuziasmon. Tiaj katolikaj grupoj ekzistas jam de longe en kelkaj landoj. En Nederlando de post 4 jaroj ekzistas katolikaj grupoj en multaj urboj. Tie, ĉio estas admirinde ordigita. Ĉiu grupo dependas al la Eklezia aŭtoritato, kaj havas Pastran Direktoron, nomata de la Epiokopa Moŝto mem.

Ankaŭ en Francujo, Anglujo, Skotlando, Germanujo, Aŭstrio kaj Hispanujo ekzistas ne nur naciaj fakoj de I. K. U. E. sed ankaŭ katolikaj grupoj. Ĝis nun tiaj katolikaj grupoj ne ekzistis en Belgujo. Antverpeno, la belga Metropolo, kiu, pri Esperanto, jam donis al ni bonan ekzemplon por multaj aferoj, iĝas la pioniro de la Katolika Esperantista movado je la vidpunkto de la starigo de katolikaj grupoj. Ni esperas ke aliloke en Belgujo oni sekvos la ekzemplon de niaj Antverpenaj samreligiaj, kaj ke tre baldaŭ stariĝos katolikaj grupoj en ĉiu grava belga urbo.

Sed eble estus oportune iome klarigi la kialon de nia deziro. Ni estas katolikoj kaj ni estas esperantistoj. Kiel esperantistoj ni deziras daŭrigi niajn intimajn amikajn interrilatojn kun ĉiuj aliaj gesamdeanoj. Ni deziras resti membroj de nia kara Belga Ligo Esperantista, ligo tute neŭtrala, kiu neniam

okupas sin pri politikaj aŭ religiaj demandoj. Ligo nur Esperantista, kies celo, laŭ ĝia Regularo, estas la propagando kaj la disvastigo de la Internacia lingvo de Zamenhof. Esperanto, kaj al tiu glora, tiu homema celo, ni kore kaj anime dediĉas nian tutan forton. Lojale ni kunlaboras kun ĉiuj niaj ligoj, kun niaj grupanoj, kaj fiere ni, katolikoj, povos diri ke neniam, de nia flanko, venis iun ajn signon de neneŭtraleco.

Sed, ni estas ankaŭ katolikoj, kaj estas, kompreneble, nia devo servi Esperanton tiel kiel ĉiun alian kreitaĵon, al la plej granda gloro de Dio. Same kiel la kuracistoj, la presistoj, la laboristoj, la komercistoj servigas Esperanton al siaj apartaj interesoj, kaj pro tio formas apartajn societojn kaj ligojn, ĉe kiuj Esperanto tute ne estas la celo sed nur rimedo, nur mirinda lingvilo per kiu ili povus multhelpi, multprogresigi siajn proprajn aferojn? same la katolikoj servigas, kaj pli kaj pli servigos la mirindan helplingvon en la ĉiutage vivo de la Dia Regno sur la tero, t.e. la Sankta katolika Eklezio.

Ni ŝuldis al niaj karaj samideanoj tiun ĉi klarigon, sed ni ne opinias ke estonte estus necese reveni al tiu ĉi temo « Bona klarigo certigas bonajn amikojn ».

Do. Dimanĉon 26th de Januaro estas starigita en Antverpeno katolika grupo esperantista de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo sub la titolo « Paco ».

Abato Richardson, Prezidanto de la I.K.U.E. speciale alvenis de Bruselo. S^o A. Cassiers la agema Sekretario de la *organiza komitato*, per kelkaj bone elektitaj vortoj bone klarigis la celon de la nova grupo kaj legis projekton de la Regularo, kiu renkontis la aprobon ĝeneralan de la ĉeestantoj. La sekvantan merkredon la nova grupo kuvenis, kaj de post tiu dato, ĝi kunvenis regule ĉiun merkredon en sia kunvenejo, Korte Nieuwstraat. La Reverinda Patro Aug. De Bruyn, S. J. atable konsentis esti la religia Direktoro de la nova grupo. S^o A. Cassiers, 6. Vekestraat, Antwerpen, la honora Sekretario volonte donos informojn pri la grupo « Paco » al ĉiu kiu sin turnus al li. Bela detalo kiu bone montras la pian spiriton de la grupo; oni decidis ke la Prezidanto aŭ la Direktoro,

malfermos ĉiun kunsidon per la sekvanta alvoko « Sub la protekto de la S^{ta} Virgulino de bona Espero mi malfermas la kunsidon.

Notu. La malsupra artikolo perdas iom da sia aktualeco pro la prokrastita eliro de ĉi tiu numero de B. K. Tamen pro la sincera amo de ĉiuj Belgoj al la atestimata persono, ĝi povas ankoraŭ esti bonveninta al niaj gelegantoj.

Morto de sia Grafina Mosto de Flandrujo. Nacia funebro.

La nova funebro kiu endolorigas hodiaŭ la Reĝan familion estas vera nacia funebro; kaj, por konvinkiĝi pri tio, sufiĉis aŭdi la konversaciojn de la Bruselanoj mardon matene en la momento kiam la malĝoja novelo disvastiĝis en la Ĉefurbo, kaj tiel same en la tuta lando.

Burĝoj kaj malaltrunguloj, ĉiuj diris nur parolojn de profunda emocio, kortuŝantajn laŭvortojn de viva simpatio.

Unufojon plue oni sentis kiel forte Belgujo estas sincere sindona al siaj princoj, kaj kiel grandan popolamon ĉi tiuj ĝuas en ĉiuj rangoj de la popolo.

Certe jes, kiu princino plibone meritis tiujn respectegojn ol ŝi kiu ĵus mortis? De kvardek kvin jaroj kiujn ŝi loĝadis meze de la Belgioj, ŝi ne ĉesis doni la ekzemplon de la plej belaj familiaj virtoj. En sia hejmo ŝi paciencie formadis tiujn princojn sur kiuj kuŝis ĉiuj esperoj de la nacio, kaj ŝi faris ilin indaj de la rolo kiu atendis ilin. Fortigante la karakteron de siaj filoj, ŝi asekuris la estontecon de la lando, kaj neniam ŝi estis malsupera al siaj devoj.

La Belgioj tion konsciis, kaj tial ili dediĉis al ŝi dankoplenan afekcion. Ili ĝojis vidante ŝin partopreni iliajn ĝojojn kaj penojn. Ŝi estis afabla, bonvolema al ĉiuj, helpema al ĉiuj mizeroj, kaj, per sia ridetanta karito, ŝi fine algajnis tiujn kiuj kliniĝis antaŭ la admirinda indeco de ŝia vivo. Animo solide kristana kaj profunde pia, la Grafino de Flandrujo kunhelpis preĝ malavare ĉiujn farojn de apostolato aŭ de sinoferado, kaj

veran ŝuldon de dankemeco la Belgaj Katolikoj pagos preĝante al Dio por la bedaŭrata Princino. Ni estas certaj ke ni unuigas nin al ĉiurangoj kaj ĉiupartiaj Belgioj, se ni respektige petas Lian Moŝton la Reĝon akcepti niajn respektajn kandolencojn.

La Reĝo perdis sian patrinon.... Tio estas por li terura bato. Kelkiu diris ie ke la morto de patrino disrompas la vivonde homo je du fazoj. La bato estas tie ĉi des pli forta ke ĝi venas aldoniĝi al malgaja serio da funebroj. Realece, de kelkaj monatoj, niaj Gereĝoj perdis unu post alia pluajn el siaj geparencoj, kaj la morto ŝajnas obstinkruele agi kontraŭ ili kaj ilia familio.

La sincere kondolencaj sentoj de la tuta lando unuigitaj al la iliaj dolĉigu iomete ilian doloregon.

La samajn sentojn respektive esprimas ankaŭ ĉiuj Belgaj Katolikoj Esperantistoj. Ili treege estas petataj ke de tempo al tempo ili preĝu almenaŭ unu *Patronia* ĝis kiam daŭros la fenebreca tempo en la Reĝa kortego por la animo de tiu al kiu nia patrujo tiom ŝuldas pro ŝia granda influo kaj saĝaj konsiloj por ĝia bonestado.

Kivo Zoëisel.

Esperanto kaj la Framasonaro.

Antaŭ ne longe aperis en belga katolika Revuo, kies celo estas defendi la katolikan religion kontraŭ la perfido de la Framasonaro, kritiko kontraŭ Esperanto. Mi ne nur abonas tiun bonegan Revuon de post ĝia stariĝo, sed mi ankaŭ laboris por verbi al ĝi multajn subtenantojn. Mi, do, bedaŭris legi en tiu revuo raporton pri iu franca gazeto, kiu, sen iu ajn serioza ekzameno de la demando, akuzis Esperanton esti nur batalilo de la framasonoj, en ĝia milito kontraŭ la katolika religio.

Mi tuj skribis al la lerta kaj agema redaktoro, kiu estas unu el miaj plej estimataj amikoj. Bedaŭrinde li sciigis al mi ke mia letero ne povos aperi antaŭ la Maja No de lia revuo. Nu, ĉar multaj katolikaj esperantistoj skribis al mi pri tiu stranga kritiko,

mi opinias ke estas necese doni pri ĝi kelkajn klarigojn en tiu ĉi Bulteno.

La vera stato de la afero estas tiel klara, tiel evidenta ke ĉiu esperantista ĝin komprenos sen iu klarigo. Efektive, Esperanto estas lingvo, nur lingvo. Ĝi estas lingvo tiel facile, tiel simpla, kaj samtempe tiel klara kaj logika, ke iu ajn homo je normala intelekto povas ĝin perfekte lerni, kaj uzadi post unu aŭ du monatoj de studado. Do, kompreneble, ĉiu societo aŭ aro da homoj, kiu celas internaciajn rilatojn, ĉu tiu celo estas bona aŭ malbona, volonte kaj nature, servigas al si Esperanton. Ne estas do dube, ke la Framasonaro, perfida sekto kiu havas anojn en ĉiu lando, uzas kaj uzos pli kaj pli, Esperanton, sammaniere ke ĝi uzas la presaron, la literaturon, kaj aliajn rimedojn neŭtralajn, serveblajn indifere, por la bono aŭ por la malbono.

Sed, kio estas la konkludo evidenta al ĉiu kiu posedas eĉ la plej ordinaran inteligentcon? Jen tiu konkludo: ĉar Esperanto povas potence helpi la malamikojn de nia S^{ta} Religio, estus ne nur stulteco, sed eĉ krimo forlasi tian batalilon ekskluzive inter iliaj manoj. Male, estas nia devo uzi Esperanton, tiel kiel ni jam de longe uzas la presaron, la arton, la literaturon k. t. p. por defendi la Eklezion de kristo kontraŭ la atakoj de ĝiaj malamikoj. Sed, plue, ĉar precise, « in casu », ni devas malkovri la malpiajn sekretojn de la Framasonaro, necese estas ke ni bone lernu la internacian lingvon, per kiu tiu sekreta societo korespondas kun siaj anoj, ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en Azio kaj Afriko.

Cetere la *inteligentaj* katolikoj (domaĝe, ne ĉiu katoliko meritas tiun kvalitecon) praktike agas laŭ tiu konkludo de post multaj jaroj. La pia kaj klera Abato Peltier fondis sian internacian revuon « Espero Katolika », ne nur por interrilati kun ĉiulandaj katolikoj, sed ankaŭ por defendi la S^{an} Eklezion kontraŭ ĝiaj diverslandaj malamikoj.

Plue, en niaj du unuaj katolikaj kongresoj, en Paris 1910 kaj en La Hago 1911 ni pritraktis la demandon: « Kiel, per Esperanto, defendi nian sanktan religion kontraŭ

la atakoj de la sekretaj societoj. Fine, dum nia Tria Kongreso en Budapest 1912, sub la prezidanteco de tiu agema Prelato, Mgr Giesswein ni proponis la fondon de speciala « Anti-framasona Ligo », internacia kaj tutmonda; La Kongreso faris al mi, membro de la « Ligue Antimaçonique Belge », la honoron delegi min por alporti al niaj belgaj amikoj la salutojn, kaj bondezirojn de la kongreso, kaj por samtempe esprimi ĝian deziron: « kunlabori kun ĝi al la defendo de la S^{an} Eklezio de Kristo kontraŭ la perfidaj klopodoj de la tutmonda, malpia Framasona sekto ».

Nu, la Revuo kiu enhavas tiun tute eraran kritikon de Esperanto estas precise la oficiala Organo de la « Belga Antiframasona Ligo ». Do, ni povas fidi al ia bona kaj tutestiminda Redaktoro por ke li donu en la Maja N^o de sia Bulteno la saman publikecon al nia klarigo, kiel li donis al nia franca kritikulo.

A. RICHARDSON

Frans Van Cauwelaert kaj liaj posteuloj.

Frans Van Cauwelaert, la juna Antwerpen'a riprezentanto, la elokventa oratoro, la ardanta patrioto kaj fervora porflandra lingvo batalanto, diris en sia belega, riĉforma, dolĉeflua kaj samtempe gravesona lingvo rimarkindan paroladon okaze de la Ĉefministra deklaro en la malfermo de la Belga deputatara Ĉambro. Li parolis pri la demandoj de la mezostato, de la lernejoj, de la burĝa egaleco rilate al la militistara servuto, pri la ŝanĝo de la konstitucio, kaj precipe pri la flandra lingvo en la armeo.

Ĉi tiun lastan lokon el lia parolo ni volas precipe rimarkigi, tial ke ĝi tute koncernas la movadon por la flandra lingvo. Do esperu ni ke ĝi estos agrabla al la gelegantoj de nia kara « Belga Katolika » kaj ankaŭ al ĉiuj flandralingvanoj-Esperantistoj.

• Nenur, diris la oratoro, per fizikaj rimedoj oni povas defendi sian landon, la moralaj rimedoj estas nemal multe interesaj. Ne sole per la metalaj buŝoj de la paflegaro, sed

ankaŭ en la animoj de la militisto la forto de la patrujo devas eĥoadi, kaj nenia ĉirkaŭanta murego havas tiom multe valoran defendon ĉirkaŭ nia flago kiom la entuziasma sinofera spirito de la burĝoj. Kaj tial antaŭ ĉio la soldato devas esti hejme en la kazerno, li ne devas tiam siajn oficirojn kaj suboficirojn, kiel fieregajn, malhumilajn fremdulojn, sed li devas povi kunparoli kun ili en sia propra lingvo.

» Niaj flandralingvaj soldatoj ne povas tre ŝati sian flagon kiel konvenas, nek havi la fidon necesan en la oficiroj por iri ĝojanime al la morto ĉe la ordono de siaj estroj, tiel longe ke inter ambaŭ ekzistas la distanco, tiu malhela aero de la lingva fremdeco.

» Ni postulas ke finĝu la stato de malpliestado, de popola perforugado, kiu, post tiom da jaroj ekzistas ankoraŭ en nia militistaro en ĉi-tiu libera patrujo.

» Kaj al tio sin ligas kvazaŭ per si mem alia konsidero. La landdefendo ne kuŝas sole sur la rimedoj kiujn la militistaro nepre povas disponi, sed ĝia pli profunda fundamento estas la elportebla forto de la popolo, ĝia financa potenco, ĝia bonfartado, ĝia morala kaj spirita potenco. Tial ni postulas ankaŭ ke nia popolo fine iom pli supreniĝu, ke estu eble por la flandrolingva popolo ke ĝi iru la vojon de la memevolvido per plena instruado en kaj per sia propra lingvo, same kiel la Valonoj jam de longe posedas la privilegion.

» Se ni postulas ke la flandralingva popolo iam atingu la egalecon, ke ĝi fariĝu popolo de plenrajtigatoj, ne de duonrajtigatoj, ni ĝin postulas ankaŭ en la nomo de la komuna patrujo. Ni tute ne postulas malplilarĝigi la rajtojn de la Valona popolo, ni ne postulas fari al ĝi maljustecon. La propra sperto troforte sentigis nin kiom gento povas suferi, kiam ĝi estas senigata de siaj vivo-rajtoj.

» Ni postulas nur ke la flandralingvanoj ne restu pli longe kondamnataj al stato de ne plenkreskuloj, sed ke per siaj propraj plialtaj statsituacioj, kiuj devas esti kvazaŭ la kreskorganoj de ĝi popolo, ĝi iam povu ĉiuflanke sin malvolvi el tutaj siaj fortoj.

» Ni postulas ke en la regado fariĝu egaleco inter valonlingvanoj kaj flandralingvanoj: tio estas la tasko de la registaro, kaj ĝi devas memori ke ni mem ne kunlaborados al la malfortigado de nia popola forto. Plue, ni

kuraĝas ankaŭ postuli al la Ĉambro ke ĝi ne rifuzu sian interesigon al niaj lingvaj interesoj kaj precipe ne al la demando de la flandriigo de la Genta Altlernejo.

» Mi estas konvinkita ke, kiam ni havos la okazon en larĝa Ĉambrodiskutado konigi al tiuj, kiuj povus esti kontraŭaj al tiu flandriigo, niajn celadojn kaj niajn motivojn, ke, mi diras, multaj antaŭjuĝoj foriĝos, kaj ke, sur la vojo de egaleco, ni alproksimiĝos je unu paŝo la interrasan paciĝon.

Anstataŭ plilarĝigi la rompaĵon inter Valonoj kaj Flandranoj, la alproksimiĝo fariĝos pligranda, kaj la interrilatoj inter ambaŭ estos plifortigitaj. Ĉar, Sinjoroj, ni, Flandralingvanoj, ni ne apartenas al tiuj kiuj serĉas nian rajton en la malfeliĉo de la lando, en la regeca apartiĝo, kiel ĝi estas senpripense kaj senkondiĉe projektita de kelkuloj.

» Ni, ne ili, estas la senrajtigitaj de okdek jaroj, kaj post okdek jaroj ni havas ankoraŭ sufiĉan paciencon atendi ankoraŭ kelkan tempon plenan rajtrebonigon, sed la maljusteco ne povas daŭradi je eterne: iam la tago de la reviviĝo devas tagiĝi en sia tuta plenpleneco.

El Belgaj Ĉambraj aktoj tradukis
kivo Zoersel.

La Floro.

Flor' al li restas
En lia mizer'.
Dolĉa konsolo
En akra sufer'.

Fluas la larmoj
Ĉu tremas la kor' ?
Ŝia rideto :
Jen help' en dolor'

Ame ŝi zorgas
Pri sia trezor' ;,
Poste lin kuŝas
En tombon kun plor'.

Tiam ŝi velkos
De vundo en kor',
Ĝis al Ĉielo
Vokiĝos la Flor'

Imitata de Germana versaĵo
« RAMO »

Vizito al la Hospitalo de la Granda S^{ta} Bernardo.

N. B. La aŭtoro de tiu ĉi skizo estas 14 jara junulo. li verkis ĝin post nur 3 semajna studo de Esperanto. Ni presigas ĝin tute ne ŝangita, por ke ĝi estu pruvo de la mirinda facileco de Esperanto.

Inter la memoraĵoj de la libertempo, unu el la plej ŝatitaj de mi estas nia vizito al la Granda Sankta Bernardo, ĝi okazis dum la Aŭgusta monato, kaj tamen terura neĝŝtormo regnis ĉirkaŭ ni. Estis malvarmo je kvin grandoj subnula.

La veturiloj estis kovritaj de glaciero.

Vere, la bojoj de la grandaj hundoj, anoncante ke la montazilo estis proksima refortigis nin.

Kiom bonan akcepton oni ricevis de la monaĥoj! La malbona vetero de tiu somera tago, pensigis nin pri la longa enŝlosigo de tiuj pastroj dum la vintro.

Post la vivo brua de la hoteloj, la impresado de tio akcepto sen nenia ideo pri gajno estis tre forta.

La granda loĝejo, kun larĝaj koridoroj, kie la grandaj hundoj blankaj kaj flavruĝaj vagis, malkovris al vi gastemon kiun oni kredis perdita en la mondo.

Dum la ventego, oni vizitis la muzeon, la bibliotekon, la belan kapelon, kaj oni iris vidi, en angulo bone varma, la last-venitajn el la modestaj herooj de la hospitalo, la hundojn!

Morgaŭe, oni vekigis je la sono de la sonorilo, ĉar tie oni partoprenas iom al la regulo de la loko. Nun oni sonis por la Meso. Post tio, la bona matenmanĝo atendis nin, sur la tablo larĝe kovrita.

Ekstere, estis la vintro, sed la ŝtormo estis kvietigita.

Post kelkaj horoj, la horizonto heliĝis, la lago liberigis, kaj la statuo de S^{ta} Bernardo aperas je la Itala flanko.

La bonaj patroj demandis ankoraŭ ĉu nenio mankis al ni, ni dankis ilin tufkore, kaj,

malgraŭ la malvarmo ni trapasis la mont-pasejon de « FENESTRO ».

Ho! kia superega spektaklo! kia grandioza panoramo!

Sed, malgraŭ tiuj belaĵoj, niaj rigardoj turnis al la loĝejo gastema, kie la registoj de granda sankta Bernardo vivas, por la bono de siaj fratoj, izolataj de la mondo, suferantaj pro la rigoroj de la vintro.

J. GAUTIER,

Studento de la 4^a klaso.

Alvenu multnombre al Romo.

Pro la neceso tuj eldoni nian Bultenon, kiu jam estas multe tro malfrua, ni ne povas presigi en tiu ĉi N^o la ĝojajn novaĵojn kiujn ni ĵus ricevis de nia agema Sekretario ĝenerala S^o Colas, post lia reveno de la Eterna Urbo. Sufiĉe estos nune diri ke S^o Colas ricevis en Romo bonegan akcepton de du Eminentaj Kardinaloj, de multaj Prelatoj kaj Religiaj Estroj. Li eĉ havigis la maloftan privilegion de *privato* audienco kun la S^o Patro, sed bedaŭrinde, pro la subita, sed dank' al Dio, ne grava malsano de Lia Papa Moŝto, S^o Colas ne povis ĝui tiun honoron je la tago fiksita, kaj la morgaŭantagon li devis forlasi Romon.

Tamen, dum la dusemajnoj kiujn li pasigis en Romo, li ĉion bone aranĝis por nia Pilgrimo. Li havigis rabaton ĉe la Italaj kaj Francaj fervojoj bonajn kaj tre malkarajn loĝejojn k t p. Do, karaj gekongresontoj, turnu vin tuj por viaj kongreskartoj kaj por havi ĉiujn informojn al nia Honora Kasisto F^{ino} Larroche, 55 rue de Vaugirard, Paris.

B. K

Kongreskarto kostas 5 frankojn.

Esperantistoj.

En ĉiuj lokoj de la tuta mondo, mi serĉas gereprezentantojn por disvastigadi. de mi, fabrikitajn Esperantajn Artikolojn, bezonatajn al ĉiu persono; ankaŭ por ne Esperantistoj.

La Artikoloj, samtempe, servas, ankaŭ, kiel la plej grava propagandilo por la lingvo Esperanto.

Specimenojn kaj prezarojn en la lingvo Esperanto mi sendas senpage.

Leterojn en ne Esperanta lingvo mi ne akceptas.

A MIROPOLEKIJ BUDAPEST
V. Vaczi-ut. 4, (Hungarujo).

Geesperantistoj,

Se vi deziras havigi la plej perfektan Gramofonon, mendu la lastan elpenson, t. e. la Gramofonon sen trumpeto kaj sen pikilo. La safiro de « Pathé » anstataŭas kaj multe superas la malnovan pikilon. Multaj Pastroj, Kolegioj k. t. p. sendas laŭdemajn leterojn al la Fabrikistoj. Petu cirkulerojn de la Société Française des Machines Parlantes, 89, Boulevard Brune, Paris.

Atentu Geesperantistoj.

La plej efika kuracilo por la tuso kaj ĉiaj malsanoj de la gorĝo, brusto aŭ bronkoj, estas la mondkonataj pasteloj:

Spa Goudron

haveblaj ĉe multaj apotekistoj kaj *rekte de la elpensinto*, S-ro. Desonay, Spa, Belgujo. en beleta skatoleteto je 60 spesdekoj = fr. 1.50.

Abato Richardson skribis al S-ro. Desonay de Bruselo: « Korajn dankojn pro viaj pas-
teloj « SPA GOUDRON ». Dank' al ili mia
bronkita tuso malaperis preskaŭ ensorĉe ».

« LA ONDO DE ESPERANTO »

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis senpage romanon de A. Tolstoj « *Princo Serebrjanij* ». kies prezo por ne-abonintoj estas Sm. 1,60 afr. Nun ĉiu abonanto de la j. 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — senpage ricevos donace belan Esper libron:

« ORIENTA ALMANAKO »

el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartveta, k. t. p. k. t. p.

« La Ondo » aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16 – 24 paĝ. Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originale kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdoto. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.).

Anonco en « Koresp Fako »

3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo « Esperanto » (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Esper. librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag de Esp. ĉekbanko.

ITALA LINGVO

per ESPERANTO

ITALA LINGVO estas tiel simila al Esperanto ke ĉiu Esperantisto povas per nur UNU LECIONO ĝin legi, per DUDEK LECIONOJ ĝin kompreni.

Sekve revueto « L'ESPERANTO » iniciatas instruon de LINGVO ILALA por ĉiulandaj Esperantistoj. ĝin prezentante sub esperanta alfabeto.

LECIONOJ aperas regule la 10.^{an} kaj la 25.^{an} de ĉin monato

Abonu sendante 1 Sm. al Eldonisto.

A. PAOLET - S. Vito al Taglimento
(Udine - Italujo)

INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.

(I. C. E.)

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj. la Abono = frkj. 2.50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin 16, Forest-Bruxelles.

PROponoj POR INTERKorespondado.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ. Ni nepre altiras la atenton al ĉi tiu avizo.

N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.

S^{ro} J. Merino, Berabeŭ, Argentina Respubliko.

La membroj de la Grupo « Zamenhof », sin turni al S^{ro} Richardson 121, Rue du Marais, Bruselo.

La membroj de la Grupo « Antaŭen », sin turni al la Prezidanto S^{ro} E. Baez, Montenegro Strato, 13, Bruselo.

Pastro Decoene, Roman Catholic Church, Brandon (Man.) Canada. Povas nur doni adresojn, ne persone korespondi.

S^{ro} Doktorino Biske, por la Grupo de Spa, Hôtel de la chaîne d'or. Povas doni multajn adresojn.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso: S^{ro} Rusterholz, Prezidanto 22, Marschalkenstrasse.

La membroj de la « **Novkastela Societo de Katolikaj Esperantistoj** », sin turnu al la Sekretario, S^{ro} Wallace-Mackay, 10, Roxburgh Place, Newcastle-Upon-Tyne, Anglujo.

S^{ro} W. E. Damon, M. D. 813 John St. Portsmouth Ohio. V. S. A.

La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

AREN DON K



Akceptas mendojn por ĉiuj
Esperantaj libroj.

Vendas Esperantajn verkojn,
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn
Esperantistajn insignojn
k. t. p.

Kelkaj verkoj el la « Librejo »

Spirita Juvelaro	fr. 2.20
Katolika Preĝaro	fr. 2.60
La Kvar Evangelioj	fr. 1.60
Hebrea Kalendaro	fr. 0.50
Fabiola	fr. 3.80

k. t. pl.

Adresu ĉiujn mendojn al :

La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »
AREN DON K

LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Wittexyck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C^o Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

HOTELOJ

COURTRAI: « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko,
apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

Oni parolas Esperante.

LONDONO: Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ».
Sinjorino O'Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater,
London, W. Tre modraj prezoj.

Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.
Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj
Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj: ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX
kaj Filoj: 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.